




Oficiala Organo
de

Flandra
Ligo
Esperantista



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.

Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpaga.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag

Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

En okcidento nenio nova — Remarque.	Fr. 55,— bind
La Viro el Francujo — Ivans	29,— »
Per Balono al la Poluso — Andrée	65,— »
Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim	29,— »
La Ora ŝtuparo — Oppenheim	29,— »
Ŝi — H. Rider Haggard	29,— »
Tra la Labirinto de la Gramatiko	45,— »
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50 broŝ.
Amo kaj Poezio — Jan Van Schoor	10,— »
La Du Amatinoj — de Musset	7,50 »
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,— »
Gösta Berling — S. Lagerlöf	45,— »
La Homaj rasoj de la Mondo	24,— »
Kudlago, la malgranda eskimo	5,— »
La Juna Vivo (1934-1935)	15,— »
Pallieter — F. Timmermans	35,— »
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto	4,— »
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz.	18,— »
Verdaj Donkiĥotoj — J. Baghy.	18,— »
Gaja Lernolibro (ilustrita)	12,— »
Examenopgaven	12,— »
Leerboek Dirksen — 2 deelen	18,— »
Blinda Rozo — H. Conscience	4,— »
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck	5,— »
Woordenboekje Blok (1890 stamwoorden)	2,— »
Schidlof Zakwoordenboek	30,— »
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj	15,— »
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n° 1)	10,— »

INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.

Verda stelo, kun kruco: 2,50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.


Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5.— fr. por 10 folioj.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1.— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3.— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate

Ĉefredaktoro:
C. Schroeyers
Transvaalstraat, 10
Berchem
Antwerpen



Administranto:
Gerard Debrouwere
Magdalenastr. 29
Kortrijk
Tel.: 1654

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj
Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpaga.
Poŝtĉeko: 2321.50 de F. L. E. Kortrijk.

Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DE-
BROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT,
H. VAN DURME kaj aliaj.

Belangrijk bericht!

Esperanto-Examen.

Op 17 Mei 1936, zal er door de zorgen van de "FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO" een Esperanto-examen afgenomen worden, in het lokaal "Nieuwe Carnot", Carnotstraat 70 te Antwerpen. De personen, welke wenschen deel te nemen aan dit examen, om het diploma te verwerven van "simpla kapableco" worden verzocht zich aan te bieden te 9 uur stipt, in bovenvermeld lokaal en dag. Het examen zal ongeveer 3 tot 4 uren duren en de inschrijvingsprijs bedraagt 10 Fr.

LA FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO.

Esperanto in de praktijk

BELGIE

Door de internationale vereeniging voor toerisme te Brussel, werd een handboek voor toeristen uitgegeven met samenspraken in 8 talen waaronder Esperanto.

Gevaert-Fotoproducten voegt een in het Esperanto gestelde gebruiksaanwijzing bij zijn artikels.

De internationale electrotechnische commissie (I.E.C.) besloot, op haar kongres van Juni 1935 te Brussel, Esperanto te gebruiken in haar groot electrotechnisch normwoordenboek.

DUITSCHLAND

Ter gelegenheid van de tuinbouwtentoonstelling te Dresden wordt, in samenwerking met de plaatselijke afdeling van den Duitschen Esperanto-Bond, een Esperanto-week gehouden.

Ter gelegenheid der Olympiaden werd door het kantoor voor vreemdelingenverkeer van Berlijn een bijzondere inlichtingsdienst voor Esperantisten ingericht.

ITALIE

De nationale vereeniging voor toerisme (ENIT) en de maatschappij der Staatsspoorwegen liet een omvangrijke brochure verschijnen getiteld: « *Cu vi konas Italion?* ».

Ten gerieve der Esperantisten gaf de stad Napels een mooi prospectus van 12 bladz. uit. Te Florencië besloot de stedelijke propagandadienst onmiddellijk tot een dergelijke uitgaaf.

De vereeniging voor toerisme « *Pro Verona* » voegt een Esperantovertaling bij den tekst van zijn gids.

NEDERLAND

Volgende Nederlandsche bladen publiceeren regelmatig een Esperantorubriek: *De Baarsjes Klok*, *De Blauwe Jeugd*, *De Buurtbode*, *Nieuwe Fakkels*, *Haagsche Post*, *Laakkwartier*, *Publieke Opinie*, *Radio-gids Vara*, *Wegeners Amsterdamsche buurtbladen*.

Te Utrecht wordt van 14 tot 20 April een internationale paedagogische konferentie gehouden, waarin de vertalingen behalve in 't Nederlandsch, Duitsch, Engelsch en Fransch ook in 't Esperanto zullen geschieden.

De Nederlandsche commissie voor het woordenboek over verlichtingswetenschap, besloot op 3 Maart j. l. dat de officiële Nederlandsche uitgaaf van dit woordenboek ook de Esperanto-vertaling zou behelzen van de technische uitdrukkingen.

OOSTENRIJK

Te Weenen liet het kantoor voor vreemdelingenverkeer een nieuw, rijk geïllustreerd prospectus van 16 bladz. verschijnen.

De handelskamer van Weenen voegt een vertaling in Esperanto bij haar officiële warenlijsten.

Het Oostenrijksch postwezen liet een nieuwe reeks prentkaarten verschijnen met verklarenden tekst in Esperanto.

Te Weenen werd bij de hoogeschool voor wereldhandel, Esperanto op het leerprogramma geplaatst.

ROEMENIE

De industrie en handelskamer van Bukarest gaf een adresboek van 150 bladz. uit in het Roemeensch, Fransch, Duitsch en Esperanto.

YOUGO-SLAVIE

In Yougo-Slavië organiseerde men een « groene week ». Men hield 10 openbare voordrachten, een radiorede, gaf 15 radioberichten; 49 krantenartikelen verschenen; 4 tentoonstellingen werden gehouden en 400.000 strooibiljetten uitgegeven. De kursussen in Zagreb en Split tellen onderscheidenlijk 250 en 200 deelnemers.

E. CORTVRIENDT.

Flandra Ligo Esperantista

GENERALA KUNVENO EN GENT, 5 APRILO 1936

La kunveno malfermas je la 10 1/2, sub prezido de S.ro Rainson. Estas reprezentataj la grupoj el Antwerpen, Brussel, Mechelen, Kortrijk, Roeselare, Gent; ankaŭ ĉeestas izoluloj el diversaj lokoj kaj la rumana Cseh-instruisto S.ro Ornstein.

La kunsido aprobas la raporton de la antaŭa kunveno.

S.ro Rainson raportas pri la grandskala propagando kiun li faris por organizo de Cseh-metodaj kursoj en 6 diversaj lokoj. Tiu kurs serio nun finas kun 170 gelernantoj; nova kurso baldaŭ komencos sed S.ro Rainson ne povas daŭrigi sola la organizon, li bezonas helpantojn.

Rilate la valoron de la Cseh-metodo ekzistas en Flandrujo ankoraŭ multe da skeptikismo kaj kelkloke la kurso okazis eĉ malgraŭ la pasiva rezisto de la grupo.

La rumana profesoro Ornstein deklaras ke ĉiuj helpis kaj estis favoraj, krom la esperantistoj; la Belglanda movado estas la plej malvigla el ĉiuj landoj kiujn li vizitis; li difinas la kaŭzon: manko je idealismo.

Laŭ S.ro Ornstein « Flandra Esperantisto » ne multe valoras, la teksto ne estas interesa, enestas malbonaj poemoj, k. t. p. Tiu aserto provokas la intervenon de S.ro Schroevers, ĉefredaktoro, kaj de la liga sekretario, kiuj ĝin kontestas. Cent kaj pli da preferoj povas ekzisti pri enhavo de bulteno kaj ĉiuj devus esti kontentigataj; ĝis nun la enhavo estis tiel dozita por prezenti la plej grandan variecon, kaj rimarkoj de la leganto estas ĉiam bonvenaj. « Flandra Esperantisto » certe ne staras je la kapo de la esperantista gazetaro sed neniu tamen rajtas pretendi ke ĝi ne okupas honorindan lokon, despli ke ni ne havas salajritajn laborantojn.

S.ro Cortvriendt demandas ke F. E. enhavu flandralingvan parton, por ebligi enpenetron inter la neesperantista publiko; aliaj naciaj revuoj agas same.

Por fini la diskuton pri punkto 2, oni interkonsentas ke de nun F. E. enhavu 2 propagandajn paĝojn flandralingvajn, kiujn redaktos S.anoj Rainson kaj Cortvriendt.

Sekve al la intertraktadoj de la Liga kunveno de 8-12-35, la prezidanto demandas voĉdonon, per jes aŭ ne, sen aliaj komentarioj aŭ konsideroj, se FLE devas aliĝi al internacia asocio.

Ĉiuj ĉeestantoj jesas senescepte.

La prezidanto deklaras ke, je konvena momento kaj kiam ekzistos financa ebleco, la estraro do scios kion fari.

Koncerne la Pentekostan kongreson, F.ino Terryn diras ke la programo nun estas definitiva ; la detaloj aperis en F. E. ; Gent atendas la gekongresanojn el la en- kaj eksterlando !

S.ro Cortvriendt laŭtlegas la proponon kiun li sendis al la estraranoj por financa reorganizo de la Ligo.

Ĝis nun, escepte je kontraŭavizo, la abonantoj de F. E. fariĝis aŭtomate liganoj ; el tiu erara organizmetodo rezultas ke la Ligo niam disponas pri propra enkasoj, ĉar la abonkoto eĉ ne sufiĉas por la preskotoj.

La kunsido aprobas ke tiu propono estu submetota al la venonta ĝenerala kunveno.

Okazos financa apartigo de la Ligo kaj de la revuo.

La jarkotizoj fariĝos jenaj :

-simpla ligano, 5 fr.

-ligano-abonanto, 25 fr.

-abonanto, 20 fr.

La aliĝintaj grupoj havos la devon anigi ĉiujn siajn membrojn al la Ligo.

En la flandra rubriko de la revuo estos notitaj la ĉefaj sukcesoj de Esperanto. S.ro Cortvriendt insistas por ke la propagandistoj uzu tiujn novaĵojn por represo en la gazetaro ; urgaj informoj eventuale estos komunikataj de la sekretario per cirkuleroj.

La 2-3-36 S.ro Calloens skribis al la sekretario ke li ankoraŭ ne ricevis la rubrikon por « Toerisme » promesitan de S.ro Lenaers ; S.ro prezidanto respondas ke tiu rubriko estas sendita rekte al S.ro Vanoverstraeten sed ke ĝi ni aperis, malgraŭ ripetita demando.

Post elĉerpiĝo de la tagordo, rekomencis la diskutado pri la Cseh-kurso. Ĉu ĝi superas la libro-metodan ? Antagonistoj kaj protagonistoj ne volas cedi ; sendube, en la Cseh- same kiel en la libro-metodo, ne ĉiuj instruistoj atingas samgradan nivelon de perfekteco sed fakte estas kaj restas ke gelernantoj de Cseh-metoda kurso almenaŭ restas ĝis la fino.

S.ro Rainson diras ke li alportos al Flandra Esperantisto la 500 bezonatajn abonantojn, sed estas la Ligo kaj ne la instruisto kiu devas esti kapabla konservi la novajn esperantistojn en la movado.

La kunveno finis je la 1 1/4 h.

La sekretario.

7a Flandra Kongreso Gent

30an KAJ 31an DE MAJO KAJ 1an DE
JUNIO 1936.

Mendojn kaj monsendojn oni bonvolu fari je P. Ĉ. 1530-50 je nomo de Ach. De Maertelaere, Proveniersterstraat, 25, Gent. Korespondadojn por la organiza komitato oni sendu al la adreso : Raapstraat, 82, Gent.

SEPA KOMUNIKO


Kotizo : Fr. 12.—.

Glumarkoj trikoloraj : po Fr. 6.— la 100.

LASTAJ ANTAŬKONGRESAJ REKOMENDOJ

La O. K. petas la kongresantojn, kiuj ne jam rezervigis al si loĝadon, kaj tion deziras, tuj prizorgi ĝin, ĉar ni neniel plu povos havigi ĉambrojn post la *15a de Majo*.

Ankaŭ priatentu tiun daton por la *ŝipekskurso, festeno kaj lunda tagmanĝo*.



GENT : LA TURETO : gildodomo de la Taniŝtoj (1480)..

Ni insiste petas la kongresanojn kiel eble plej multe peti ĉambrojn por du personoj, ĉar la prezoj estas pli favoraj, kaj plie ni povas disponi nur pri malmultaj unupersonaj ĉambroj.

Oni ankaŭ ne forgesu sciigi kiun viziton oni deziras partopreni, por ke ni povu havigi senpagan eniron.

Preparu kaj kunportu premieton, por la tombolo de nekonataj premioj ; bone enpaku ĝin kaj transdonu ĝin jam ĉe via alveno. Vi certe gajnos ion alian.

Pretigante vian valizon, ne forgesu enmeti la kongresan kantarono, kaj kunportu ĝin ĉe ambaŭ vesperaj festoj kaj ĉe la festeno.

Al la grupestraroj ni rekomendas vigle propagandi inter ĝiaj anoj kaj tiel partopreni la konkurson por la premio ; plej granda grupo, (konigu la grupon). Kaj kiu gajnos la premion por la plej granda eksterlanda karavano ?


Kiu ne jam sin provizis je glumarkoj tuj tion faru, ĉar restas malgranda kvanto disponebla, kaj represo ne okazos.

La grupaj flagportistoj ne lasu siajn flagojn en la tirkesto!!!

La O. K. firme esperas ke ĉiuj kongresanoj prientos la akuratecon por ne malhelpi la bonan funkciadon de ĉiuj aranĝoj.

Gis revido en Gent je Pentekosto !

Ce la apero de la lasta antaŭkongresa artikolo, ni kore dankas la estron kaj la oficistinojn de la urba informoficejo por turistoj, pro la afableco per kiu ili ĉiumonate havigis al ni la kliŝojn uzitajn por la aperintaj bildoj.



GENT : La Granda Kanono : « Dulle Griet » (Kolerema Margareto)

PLIAJ REKOMENDOJ

La O. K. sciigas ke ĝi ne plu akceptos enskribojn por la festeno kaj la lunda tagmanĝo, ĉe la komenco de tiuj aranĝoj, oni nepre devas antaŭmendi, kaj ne forgesu transdoni la koncernen karteton dum la manĝado.

Ĉiuj kongresaj aranĝoj estas alireblaj nur de la kongresanoj. Ĉi lastaj bonvolu surmeti la kongresan insignon.

Ni varme rekomendas la akceptejon por la vespermanĝoj.

Ĉiuj kongresanoj ricevos belan urboplanon kun aliflanke urbaj bildoj kaj esperanta teksto : « Promenado tra Malnova Gent ». Estas la oficiala informoficejo por turistoj kiu afable tion donacos.

Krom la eksterlandanoj menciitoj en la antaŭa komuniko, estas nun ankaŭ anĝloj kiuj jam enskribis.

Grava Peto. Personoj aŭ grupoj kiuj volas deklami aŭ kanti dum la vesperaj festoj, bonvolu tuj interrilati kun la O. K.

La Organiza Komitato.

DEFINITIVA PROGRAMO DE LA KONGRESO
ESTIMATA SAMIDEAN(IN)O,

La Organiza Komitato de la 7a Flandra Kongreso de Esperanto, havas la plezuron komuniki al vi la definitivan programon kunmetitan tiamaniere ke ĝi prezentas allogaĵon por ĉies gusto, laŭ vidpunktoj Esperantista, turista kaj amuza.

Gent estas unu el la plej belaj kaj interesaj urboj el Flandrujo kaj la Komitato zorgis por malmultekosta restado. Frua aliĝo plifaciligas la organizon ; do, enskribu tuj !

Kun antaŭdanko kaj samideanaj salutoj,

La Prezidantino : JULIETTE TERRYN.

SABATON, 30-an DE MAJO

14a h. : Malfermo de la akceptejo en restoracio « La Renommée », Sint-Baafsplein, 3.

18 h. : Kunveno de la membroj de Flandra Esperanto-Instituto, en la akceptejo.

18,30 h. : Kunveno de la Estraro de Flandra Ligo Esperantista, en la akceptejo.

20 h. : Malfermo de la Kongreso en la « Raadskelder » (la suba salonego de la Haloj, apud la Belfrido.) Balo — tombolo (de nekornataj premioj — tiu kiu volas partopreni kunportu ion) — deklamoj — kantoj.

N. B. — Je la 19,30 la akceptejo translokiĝos al la apuda « Raadskelder ».

DIMANCON, 31-an DE MAJO

8a h. : Malfermo de la akceptejo (La Renommée).

9 h. : Katolika diservo kun E-prediko, en la kapelo de la Dominikanoj, Hoogstraat, 39.

9 h. : Protestanta diservo kun E-prediko, en la « Hervormde Kerk », Brabantdam.

8,45 h. : Vizito al la Belfrido (Belfort). Oni sin antaŭe enskribu.

10 h. : Kunveno de ĉiuj kongresanoj sur la Paradoplaco (Kouter).

10.15 h. : Sekvantara iro al la urbdomo.

10.45 h. : Fotografado ĉe la ŝtuparo de la urbdomo.

11 h. : Oficiala akcepto de la urbestro kaj vizito de la urbdomo.

12 h. : Jarkunsido de Flandra Ligo Esperantista, en la Reĝa Flandra Urbteatro.

13,30 h. : Festeno (kun Flandra folklorista surprizo) en la « Raadskelder ».

16 h. : Promenadetoj, kaj vizitoj al : a) malgranda beginejo; b) grafa kastelo; c) Sta. Bavo preĝejo; folkloro muzeo. (Konigu vian preferon — la kongresanoj estos gvidataj grupe).

17 h. : Kunveno de F.U.K.E. en la saloneto de la Patroj Dominikanoj, Hoogstraat, 39.

20 h. : Esperantista festo en la « Raadskelder » — Balo — Elekte de gereĝoj kaj gekorteganoj. — Disdono de premioj al la plej granda grupo kaj al la plej granda eksterlanda karavano.

N. B. — Je la 10,30 h. la akceptejo fermiĝos. La alvenontoj sin prezentu en la koncernan ejon laŭ la horo.

LUNDON, 1-an DE JUNIO

9a h. : Akurate, forveturo de la ŝipo(j) ĉe la « Recollettenbrug » (ponto apud la juĝejo).

9,15 h. : Ebleco surŝipigi ĉe la « Albertbrug » (apud St. Petrostacidomo) por tiuj kongresanoj kiuj volas deponi siajn valizojn en la pakajejon de la stacidomo.

11 h. : Alveno en Deurle. Laŭprefere : Vizito al la muzeo Claus — naĝado — promenado — ludoj.

12,30 h. : Tagmanĝo.

16,30 h. : Alveno ĉe la « Albertbrug ». Adiaŭo de la forvojaĝontoj. (Por la kongresanoj kiuj disponas pri pliaj 2 horoj ni povas aranĝi viziton al la Muzeo de Antikvaĵoj. Bonvolu sciigi).

La aliaj reveturos ĝis la « Recollettenbrug » kaj grupe iros al la « adiaŭa vespero » en la akceptejo « La Renommée ». Surprizo por la unua kongresano, de ekster Gent, kiu sin prezentos en la akceptejo, kaj ankaŭ por tiu kiu restos ĝislaste.

La Organiza Komitato insiste petas ke oni sciigu kiujn vizitojn oni deziras partopreni, por ke ĝi povu havigi senpagan eniron.

La kunveno de F.U.K.E. estas metita en la programo kiel faka kunveno ; ni estas pretaj ankaŭ menciigi pliajn, se ili okazos.

Pri Gentaj Festoj-Rapsodio

AŬ DULLE-GRIETA LITANIO

Nun al Vi-montras mi-sprite- kaj senhezite- « Dulle Griete ». Tio signifas, -por kiu soifas-al traduko-kaj eduko- : « Margareto la Kolerulino » ... Ŝajnas ke tiu estis grafino- sen milda doktrino-kun fera obstino-sed ne medecino-por de l' popolo malfeliĉospeco de diabla fetiĉo.

Sed kvankam estas ina nomo-nun ne temas pri persono-sed pri kanono... Ja estas vera bombardilo-longa kiel krokodilo. Antaŭ duona jarmilo-ĝi estis defendilo-de l' filoj de Gento. Ĝi estas testamento-el mezepokaj jaroj, -kiam la Gentanaro-batalis- (kaj ankaŭ en ŝnuron falis !)- por libereco-kaj prospereco-kontraŭ reĝoj kaj dukoj-kontraŭ leĝaj kadukoj...

Nun staras ĝi pace-kaj dormas lace-sur tri ŝtonoj- (kompreneble ne estas bombonoj)- kiel botelo-en vina kelo. Sed malgraŭ tio, Dulle Griete-subite-parolas-, petolas, -kaj bolas-de temp' al tempo,- kiam printempa trempo-de poeto ĝin inspiras.

Do ne miras-ĉar ĝi-al mi-rimanta poetaĉo- (kia klaĉo !)- laŭ mia peto-kun voĉo de profeto-rakontis tion-almontris iom-kiom ĝi vidis-pri kio ĝi ridis-folklora iama-sed trezoro ĉiama :

— « Mi ne parolas pri fieraj turoj-, mi ne babilos pri antikvaj muroj nek pri arkitekturo-nek pri strukturo... Nur temas pri plezura murmuro, -sekura aŭguro, -terura figuro, -kulturkarikatur, -tambura partituro, -de tiu-kiu-sin nomis Gentaj Festoj-kies gajaj restoj-groteskaj burleskoj- kadukiĝis, -subakviĝis...

« Ho, Gentaj Festoj, -plezura nesto, -magia kesto-jen la atesto tiel kiel mi memoras Vin !- tiel kiel mi odoris Vin !- tiel kiel mi priploras Vin !- Tial nun oratoras mi- ĉi tiun litanion,- kreitan sub mia kranio:

« Ho, malnovaj festoj de Gento, kiu allogis el oriento-kui altiris el okcidento-budojn, barakojn, kaj tendojn... -Ja, tuta kontingento el ĉiuj eblaj gentoj-el ĉiuj kontinentoj-centoj, centoj, kaj centoj-alvenis al tiu fragmento-de l' folkloro iama Gento !

« Aŭdu la elokventon-de l' direktoro de besta tendo-de l' flutisto kun serpento, -de l' reĝo de la korpulento...

« Aŭskultu la talenton-de l' kantisto por la « cendoj » ! Pri amanta studento-kui sur tegmento- (Ho impertinento !)- sen patra konsento-forŝtelis filinon de ĉina regento !...

« Vidu la eksperimentojn-de lerta jonglisto...

« Laŭdu la medikamentojn-de dentkuracisto-kies komentoj-kaj komplimentoj-pro kies mento-ĉesis lamentoj-kaj turmentoj de ĉiu paciento...

« Atento : Atento :- Marioneta regimento-kun akra akcento-kun vipa komento-per mok' kaj ekskremento-klaĉas pri homa gento-pri politika elokvento-pri l' popola indiferento...

« Sed estas nur fragmento-de l' fest' en urbo Gento.

« Por kontento-de frandaĵoj-klientoj-. Jen ankaŭ tendoj...

Sed subite-diris mi al Dulle Griete :

— Petas mi silenton-pri Gento-. Tia litania serpento-tia « ent »-forento — daŭrus eble dum jarcento.

Kaj ne sen grumbli ĝi silentis...

Mi adiaŭe elokventis

« Ho, Dulle Griet, en Gent

« Vi pafis kuglojn, brikojn

« Sur kap' de l' malamikoj,

« Sur fremda regiment'

« Ho, Dulle Griet, en Gent

« Vi manĝis iam plombon,

« Kaj ŝatis Vi la bombon,

Diabla la invent' !

« Ho, Dulle Griet, en Gent

Post tiu satigado

Vi restas sen grenado

En la malplena ventr'

« Ho, Dulle Griet, en Gent

NUN PAFU VERDAN STELON

En gajan bluĉielon,

Por venk' de l' Pacosent !...

Kaj, kiel vi vidas, Ne-ino,- kaj ino, Finfine jen de l' klaĉado la fino...

L. V. D. POEL.

Ĉu Vi ne jam aliĝis ?

Manieroj, viraj kaj virinaj

(De Sanne van Havelte)

Kiel viro eliras :

Li venas el la ĉambro, kuras per tri longaj paŝoj al la antaŭpordo, prenas, preferirante la vesthokaron, sian ĉapelon, metas ĝin laŭsente sur sian kapon, fermas perbate la pordon malantaŭ si kaj for li estas.

Nun la virino :

Ŝi venas el la ĉambro, revenas por vidi ĉu ŝi jam fermis la fenestron, ree eliras la ĉambron, reiras por karesi la hundon kaj al ĝi certigi ke ŝi vere tre baldaŭ revenos, ree eliras la ĉambron, suprenkuras la ŝtuparon, kombas en la dormoĉambro sian hararon, pudrumas sian nazon, prenas ĉapelon el la ŝranko, surmetas ĝin, metas ĝin iom pli maldekstren, tiras harbuklon de sub la ĉapelo, prenas mantelon el la ŝranko, almetas ĝin, butonumas ĝin, rimarkas ke ŝi sub griza mantelo portas brunajn ŝtrumpojn kaj ŝuojn, ree senmanteligas sin, almetas aliajn ŝtrumpojn, aliajn ŝuojn, almetas ree sian mantelon, prenas guteton da parfumo, naztukon, sian mansaketon, siajn gantojn, rigardas en la spegulon, rimarkas ke intertempe ŝia nazo ree briletiĝis, pudrumas denove, rigardas ankoraŭfoje en la spegulon, tiras sian ĉapelon iom pli maldekstren, malsupreniras, rigardas en la speguleton de la koridoro, eniras la ĉambron, rakontas al la hundo ke ŝi vere baldaŭ revenos, eliras la ĉambron, rigardas en la koridorspeguleton, vidas ke ŝia nazo ree briletas, pudrumas, sian nazon, ŝovas mateton, malrekte kuŝantan, rekten, malfermas la antaŭpordon, tire fermas ĝin, rigardas tra la fenestro intertenen, svingsalutas al la hundo, rimarkas ke kurteno pendas malrekte, aperigas sian ŝlosilon, malfermas la antaŭpordon, eniras la ĉambron, pendigas rekte la kurtenon : diras al la hundo k. t. p. (vidu supre), tire fermas la antaŭpordon malantaŭ si kaj kuras en la straton !!!

Virino venas hejme, tre, tre malofte malfruege, kiam ĉiu dormas. Singardeme kiel rutina rompŝtelisto, ŝi enŝovas la ŝlosilon en la ŝlosiltruon, senbruite malŝlosas, fermas senbruite, *senbruite*, la antaŭpordon, demetas siajn ŝuojn, trakuras sur siaj ŝtrumpoj la koridoron, forte subpremas sian deziron je io manĝebla, tial ke la ŝrankopordo pepas, ŝtelire sur siaj ŝtrumpoj supreniras la ŝtuparon, denombrias la ŝtupojn, ne tuŝas la dekunuan (la krakŝtupon), turnas centimetron post centimetro la pordotenilon de la dormoĉambro, senbrue senvestigas sin, sopirante rigardas la lavotablon, kaj glitas post kvin minutoj nelavite kaj... neaŭdeble inter la littukojn.

Kuŝas malvarme kaj malsate ankoraŭ horojn sendorme, dum ĉiuj dormas.

Viro malfrue venas hejme.

Per tinta ŝlosilaro li malfermas la antaŭpordon, fermas ĝin jetege. jete malfermas la pordon de la dormoĉambro, serĉas en tri ŝrankoj je fromaĝo, ne trovas, iras al la kelo. brue malsuprenirante la kelŝtuparon, trovas la fromaĝon, klake faligas tranĉilon sur la ŝtonan kuirejplankon, fermas la kuirejordon malantaŭ si, incitas la fajron

en la fajrujo, sidigas por legi la gazeton, iras, post kvaronhoro, kiam ĉiu ĵus reendormiĝis, poŝti leteron, revenas, perbate fermas la antaŭpordon, supreniras per du ŝtupoj samtempe ventegrapide la ŝtuparon, ĵete malfermas la pordon de la dormĉambro, puŝas kontraŭ seĝpiedo, ĵetegas siajn ŝuojn ekster la pordon, bleke oscedas, malfermas la kranon de la lavotablo, lavas siajn manojn kaj faligas sin en la liton tiel ke ege krakas la risortmatraco, Jam de longe li dormas, kiam la aliaj en la domo tute sendorme turniĝadas en siaj litoj.

El la « Haagsche Post » tradukis: A. LODEMA

Diversaĵoj

La Komitato de UEA decidis translokigi la oficialan sidejon de la asocio al Londono kaj nomi S-ron C. C. Goldsmith direktoro, kiel anstataŭanton de S-ro Kreuz.

* * *

Esperanto faras gravajn paŝojn sur la radio-kampo kaj ĉiutage okazas pluraj elsendoj per aŭ por Esperanto (eĉ 9 kelkfoje).

Sed ĝis nun ne estis grava gazeto esperantista radiista. Ekzistis diversaj cirkuleroj kaj la multobligita Internacia S. O. S. Bulteno. Anoncojn, oni faris ankaŭ en la gazetoj esperantistaj kaj aliaj.

De ĉi-tiu monato, Radio-Klubo Esperantista de Francujo eldonas belan gazeton kiu aperos ĉiumonate, ĉiudusemajne, laŭ la enirontaj abonoj. Ĝin redaktas nia amiko Alglave kaj donante la programojn tag-post-tage ĝi estos tre utila.

Ĝi mankis en Esperantujo, nun ĝi ekzistas kaj deziras vivi kaj plivastigi la sferon de siaj legantoj... tio, ne dependas de ĝi, sed de vi ĉiuj, estimataj samideanoj. Do, aktive deziru bonan sukceson al la nova Internacia S. O. S. Bulteno, sendante viajn abonojn, konigante ĝin inter viaj samgrupanoj. (Jarabono: Francujo kaj landoj aligintaj al Interkonsento de Stockholm: 9 Fr. Fk., aliaj landoj 12 Fr. Fk.).

Oni skribas, sendas monon, petas senpagan specimenon al s-ano Alglave Michel, 150, rue Cronte-Voye, à Blanc-Misseron (Nordfrancujo).

La aperigo de tiu gazeto, kiu temas nur pri la esperantaj radioelsendoj estas fakto, kiu en ĝi-mem montras la progresojn de nia lingvo sur la radio-kampo.

* * *

Post la 1-a de Majo la redakcio kaj la ekstergermanlanda administracio de Heroldo de Esperanto, troviĝos en Rotterdam W., Voorhaven 43. Pro financaj kaŭzoj la presejo provizore restos en Kolonjo.

* * *

Zentralbüro der Wiener Messe-A. G., Wien VII, Messeplatz, 1, eldonis tri-koloran faldprospekton, kun belaj modernaj desegnaĵoj, pri la Viena foiro.

Vieno nuntempe estas unu el la plej malmultekostaj grandurboj en la mondo. Krome la restadkosto povas esti plue plimalaltigataj per kuponaro, ricevebla ĉe ĉiuj internaciaj vojaĝoficejoj.

La prospekto estas ricevebla kontraŭ mendo ĉe supra adreso.

FRANCUJO DUM PRINTEMPO. Broŝureto eldonita de la Pariza Foiro. Ricevebla senpage de Foire de Paris-Esperanto Fako — Rue Notre-Dame des Victoires, 23, Parizo.

* * *

La urba registaro de Bonyuls sur Mer (Francujo) decidis nomstraton en la urbo « Dro. Zamenhof strato ».

* * *

Dekok urboj kaj vilaĝoj en Francujo voĉdonis por enkonduko de Oficiala Esperanto-kurso en la lernejojn..

* * *

Mendu tuj la Cekoslovoka(n) radio-Bulteno(n), ĉe la Verda Stacio, Kounicova 44 Brno. Ĝi enhavas kompletan esperantan programon de la elsendoj dum Majo.

* * *

ESPERANTO ĈE LA MILITRIFUZANTOJ. La internacia organizaĵo de la militrifuzantoj « War Resisters International » (W.R.I.) eldonas gazeton en 5 lingvoj : angla, franca, germana, hispana kaj Esperanto. En la tendaro de la danaj militrifuzantoj la lingvo Esperanto estas instruata.

CSEH-KURSOJ ĈE LA MARBORDO.

Nia Rumana samideano So. Jozef Ornstein, kiu nuntempe gvidas Ĉseh-kursojn en Bruselo kaj ĉirkaŭaj komunumoj, post sia parolado pri Hispanujo en Nieuwpoort, decidis organizi kurson ĉe la flandra marbordo.

Nepri kondiĉo por la sukceso de tiu kurso estis ke ĝi finiĝu antaŭ la turista sezono, do antaŭ Pentekosto. Tial ĝi estas oksemajna, po du lecionoj ĉiusemajne.

So. Ornstein mem faris la provlecionon Dimanĉon la 29an de Marto en hotelo Metropole en Oostende.

La provlecionon en Nieuwpoort, London la 30an de Marto kaj la gvidadon de la du kursoj li konfidis al sia edzino sino. Ornstein.

Tiu lasta provleciono, kiu estis samtempe la unua eksterlanda provleciono de la profesorino, estis vera sukceso kaj konvinkis ĉiujn ĉeestantojn, kiuj dubis ĉu pri Esperanto ĉu pri Ĉseh-metodo. Tiu sukceso cetere kreskas je ĉiu leciono, kun la simpatio kiu ligas la entuziasmajn gelernantojn al sia kompetenta instruistino.

Ĝis nun Oostende donis 25 kaj Nieuwpoort 30 lernantojn.

Restas al ni publike danki nian samideanon Son. Snykers, estro de la hotelo Metropole, kiu multe helpis je la materia ebligado de la kursoj kaj esprimi la deziron ke la samideanoj en nia lando pli kaj pli komprenu la gravecon de la organizo de Ĉseh-kursoj por nia movado.

DE BADGAST KAJ ESPERANTO.

« De Badgast », la organo de V. T. B. por la Flandra marbordo, daŭrigas sian simpatian agadon por nia lingvo. La paska numero enhavas jenajn artikolojn : Een Ĉseh-kursus voor de kust, La dunoj de nia marbordo, Waarom Esperanto ?, Beleco de marbordo. Tiu-ĉi lasta artikolo estas intervjuo de sinjorino Tini Ornstein, kiu nun-

tempe gvidas sukcesajn Ĉseh-kursojn en Oostende kaj Nieuwpoort. Ĝi estas ornamita per la portreto de nia simpatia kaj kompetenta samideanino.

Ciuj, kiuj deziras ke tiu por nia lingvo grava agado estu daŭrigata, bonvolu peti specimenan numeron kaj aboni por la jaro 1936 (prezo 7 Fr. ĉekkonto 690.84 de A. Vervaecke, 50, Jozef II-str. Oostende).

Ili estos komplete dokumentataj pri la marbordo kaj samtempe estos oferintaj por Esperanto. Pli bone hodiaŭ ol morgaŭ !

Ni gratulas

Nia simpatia membrino fraŭlino Leonie JOUKES edziniĝis la 20an de Aprilo 1936 kun Sro Charles VAN SAND.

Ni deziras al la junaj geedzoj multan feliĉon en ilia nova vivo.

* * *

Ni ankaŭ gratulas la familion Alfons DE GRUYTER-AERNOUT, pro la feliĉa naskiĝo de filineto AMELIA (la 29an. de Marto 1936).

KENNISGEVING

WIJ GEVEN..... 200 FRANK

voor de schoonste foto met uitsluitend reproductierecht voor ons en best geschikt voor cliché (proefafdruk zwart op ongekorreld papier), welke ons naar een pauw (dus op z'n mooiste genomen) voor 1 Juli 1936 wordt toegezonden. De pauw dient eene beeldmaat van ten minste 8 cm. hoogte te hebben. Naam en adres van deelnemer dient op de keerzijde der foto geschreven. Onbekroonde fotos worden terugbezorgd.

IEDEREEN MAG MEEDOEN .

inzenden aan de N. V. CHROMA, Clichéfabriek,

Van Spangenastraat, 14, Antwerpen-Centrum.

POR NIA PROPRA SKRIBMASINO.

M. Van der Linden, Astene, 5 Fr.; Danneels Moris, Astene, 5 Fr.; Hotel Pax, Deurle, 5 Fr.; Sino De Kesel, Leuven, 5 Fr.; A. Bombeke, Ledeborg, 5 Fr.; E. Van den Nesse, 2 Fr.; Moens, 1 Fr.; Sino Bombeke, 2 Fr.

POR NIA REVUO.

A. C. Kortrijk, 5 Fr.

Bibliografio

(Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

PETROLO Vol. I. Upton Sinclair (W. Bailey) (Populara Esperanto-Biblioteko No. 11) Bindita, prezo 3ŝ6p. afranko 6p. Eldonita de The Esperanto Publishing Co. Ltd. — Havebla ĉe Brita Esperantista Asocio, 142, High Holborn, London. W. C. I.

Ne necesas ke ni rakontu la tutan historion pritraktitan en la libro. Ĝia enhavo estas sufiĉe konata. Ni ĝoju pro la nova esperantigita verko de Upton Sinclair. Ĝi havigas al la Esperantistaro okazon por legi kaj trastudi tiun tre interesan libron. Kvankam foje oni renkontas en ĝi kelkajn lingvajn malfacilaĵojn, ni nur povas instigi ĉiujn aĉeti kaj legi la verkon. Ĝi estas pro sia bela aspekto kaj riĉa enhavo brila posedaĵo en ĉiu esperanta biblioteko. Kun granda intereso ni atendas la 2an. parton. (H. V. D.)

JUBILEUMBOEK 1911-1936. Uitgave der Federatie van Arbeiders-Esperantisten in het gebied van de Nederlandsche taal. Prijs : 50 cent. Libro Servo F. L. E. Postbus (0) 50 — Amsterdam.

Dit boek, versierd met vele fotos en zichten uit de Esperanto-beweging gedurende de laatste 25 jaren, geeft ons een duidelijk beeld van de vorderingen welke de Esperanto-beweging maakte. Het aantal leden dezer federatie bereikt nu ongeveer 4000. Welke noeste arbeid er noodig is, met welke mede- en tegenvallers er dient afge-rekend om zulken uitslag te bereiken in eenige jaren tijds, is duidelijk in het boek beschreven. Wij kunnen niet anders dan alle Esperantisten van Nederland en Vlaanderen aanzetten zich dit zeer interessante werk aan te schaffen. Het kan hun een spoorslag zijn om mede te werken aan den vooruitgang der beweging in ons land. (H. V. D.)

Grupa Vivo

AALST. — LA PIONIRO.

Nia kurso por komencantoj estas fininta. Ĝiuj regule ĉeestis la lecionojn, kaj fariĝis nun membroj de Pioniro. Tiamaniere nia grupo pligrandiĝis. Dum la semajnaj kunvenoj ili perfektigos sin kaj sin preparos por la ekzameno, kiu okazos en Junio.

Dum la ĝenerala kunveno de Aprilo, ni aranĝis la somerajn ekskursojn kaj perfektigan kurson. Pioniro daŭrigos paŝon post paŝo sian laboron.

ANTVERPENO. — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

Kun ĝojo ni salutis la ideon revigligi la malnovan A. P. P. K., aŭ starigi novan komitaton por propagandi Esperanton en Antverpeno kaj ĉirkaŭaĵo. Ĉu malnova ĉu nova komitato, sed en la intereso de nia lingvo, ĝi laboru vigle kaj vivu longe !

Niaj anoj, ĉiam estante Flandremaj, ne ĉiam estas kantemaj, ĉar la tempo estas delonge for, kiam ankoraŭ sonis la gajaj tonoj tra nia kunvenejo. Nun, je la antaŭvido de la 7a. kongreso en Gent, ili ree akriĝas la voĉojn.

Je la ligkunveno de 5a. de Aprilo ni ne mankis. Ni tamen revenis seniluziigitaj. Malfrua komenco. Temporaba parolado, plena je malkonstrua kritiko pri nia revuo, de So. Ornstein. Longdaŭraj diskutoj. Teda klaĉado, por fine pritakti la ceterajn punktojn en rekordtempo.

Ni ĉeestis sepope. Speciala mencio por tiuj grupoj, kiuj eĉ ne sendis unu delegiton.

BRUSSEL. — N. E. L. E.

La 8-an de Aprilo okazis nia kursfina festo. La etaĝa salono de nia ejo estis plenplena kiam je la 20-a, la instruisto komencis sian lastan lecionon.

Nome de la kursanoj el Brussel kaj Vilvoorde; unu el la lernantoj transdonis al S-ro J. H. Ornstein du belajn binditajn verkojn, i. k. La Leono de Flandrujo.. Kortuŝite la instruisto dankis kaj en bela parolado adiaŭis.

La liga prezidanto alparolis la ĉeestantojn kaj instigis ilin aboni nian revuon kaj iĝi anoj de nia ligo. Nia grupa prezidanto siavice invitis la lernantojn eniri nian grupon.

La ĉestantoj pasigis la vesperon en plej agrabla kunesto. Kantoj kaj deklamado alternis kun muziko; per tombolo kaj dancado finiĝis tiu agrabla vespero kiu ne nur estis sukcesinta laŭ amuza vidpunkto sed ankaŭ estis fruktodona por nia movado.

Por la novuloj ni organizas ĉiujauĉde, antaŭ niaj semajnaj kunvenoj, perfektigajn ekzercojn.

Ĝis nun deko el niaj anoj aliĝis al nia 7-a nacia kongreso.

MECHELEN. — ESPERANTA FESTO OKAZE DE LA FINO DE ĈSEH-KURSO.

La 6an. de Aprilo okazis Esperanta festo en la kafejo « La tri Cevaloj ». Post kantado de « La Espero », la preskaŭ 100 samideanoj (grandparte novbakitaj) aŭdis la lastan lecionon laŭ Ĉseh-metodo, kiu kompreneble estis la plej agrabla el ĉiuj. S-ro. Ornstein desegnis la Esperantan Homon kun vere majstra mano. Certe li vizitis la ekspozicion de la Homo en Antverpeno.

Por fini la profesoro trovis belajn vortojn, kiuj tuŝis la korojn de niaj novaj samideanoj. Esperanto ne nur estas lingvo, sed idealo. Li priparolis la praktikon kaj precipe almontris la plej altan celon : interfratigi la diversajn popolojn. Li nur havas unu deziron : ke ĉiuj restu fidelaj al la movado. Tial li ŝatas revidi ĉiujn, kiam poste li eble revenos.

La gelernantoj el Mechelen, Lier kaj Duffel dankis la profesoron kaj donacis belajn memorajojn. S-ro. Ornstein dankis kortuŝite kaj deklaris, sincere bedaŭri esti devigata forlasi nian gajan, amikan rondon. Prezidanto Rainson ankaŭ dankis Sron. Ornstein, kaj invitis la novajn samideanojn aliĝi al la Flandra Ligo Esperantista. Legi, skribi, paroli, jen la promeso de la Ĉseh-kurso. Sed por perfektigi la konon, necesas vigla grupa vivo.

Sekvis nun diversaj muzikaĵoj kaj deklamoj, inter kiuj ni speciale mencias la majstrajn muzikantojn de la Liera grupo.

Gajeco kaj amikeco regis kaj finfine oni eĉ dancis. Je la 1a. ni disiris post fervora « Vlaamsche Leeuw kantado ».

Atentu : Niaj grupkunvenoj nun okazas « Frascati », Begijnenstraat, ĉiun vendredon je la 7 1/2 h. Tie ni trovis veran hejmon.

OSTENDA GRUPO ESPERANTISTA.

La 29an. de Marto okazis en nia vintra ejo « Hotel Métropole » la provleciono Ĉseh-metodo. La salono aliformita en malgranda Esperanto ekspozicio tre plaĉis al la ĉeestantoj, kiuj estis je nombro de 40. Poste tamen nur 10 enskribigis sin. La 2a. leciono altiris pli da interesuloj ; ĝi estis ĉeestata de 18 personoj. Ses de niaj membroj ankaŭ enskribigis sin. Tio faras do entute 24.

Ciusemajne nia grupo kunvenas tre regule. Nun la somera-perido alproksimiĝas kaj la ekskursoj kun niaj propagandaj flagetoj venas je la tagordo.

Nia biblioteko pliriĉiĝis per deko da libroj inter kiuj estas tre interesaj.

La grupo jam de nun pridiskulis por organizi Ĉseh-metodan kurson Septembro-Oktobro.

En la estraro ni renkontis malgrandan internan ŝanĝon ĉar nia Bibliotekisto S-ano De Ruyter iĝis de nun ankaŭ kasisto, aliflanke nia fidela Sano.. De Jonghe restas komitatano de nia « Paca Stelo ».

Rilate la Kogreson en Gento, nia karavano ĉeestos multnombre kiel kutime.

En la numero de Junio ni diskonigos la ekskursaron kun la celo, ke eble pliaj gesamideanoj eksterurbaj povu eventuale akompani nin, ĉu per biciklo, aŭtobuso aŭ vagonaro.

La angulo de la serĉemuloj

Al la ensendinto de la plej bonaj solvoj, ni promesas belan premion. Ĉiu solvita vorto valoras por 1 poento. Le premio estos do por tiu, kiu akiros la plej altan nombron da trovitaj vortoj.


La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5a de Junio rekte al S.ro F. Volders — Bredastraat 94 — Antwerpen. Bonan ŝancon!

SOLVO DE PROBLEMO 3

R — Re — Ter — Tren — Reten — Repent — Penetro — Serpento — Esperanto.

Inter la multaj ensendintoj de bonaj solvoj, la du sekvantaj samideanoj gajnis premion, kiun ni alsendos post kelkaj tagoj : So. Boyens el Antverpeno kaj So. Vander Per el Kortemark (Okc. Fl.).

PROBLEMO 6.. KRUCVORTENIGMO



HORIZONTALE

- 1) tre. — pos. pron. (adj.). —
- 2) ne sufiĉe (mall.) — prepozicio. — 3) lingva idealo. — 4) prepozicio — konjunkcio. — 5) jaluzo. — 6) prefikso. — persona pronomo. — 7) urbo en Belgujo (R). — 8) AE. — LEA. (senkapigita). — 9) enuigi. (R). — numeralo.

VERTIKALE

- 1) mala de l.) horiz. — talenteo (R). — 2) konjunkcio. — prepozicio. — 3) laboro de plektisto. — 4) konjunkcio. — ekkrio de bedaŭro. — 5) per revuo (adv.). — 6) prepozicio. — denove. — 7) manaparato por trovi la nordon (R). — 8) tio estas (mallong.). — loka prepozicio. — 9) virto. — filo de filo (R).

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

Voorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
Ondervoorzitter: E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Bernard Bassleer, St. Rochuslaan, 93, Kortrijk.
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.
Postcheck: Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk, nr. 2321.50.
Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.
Lidmaatschap (met maandblad): 20 fr. per jaar.

Aangesloten groepen:

Aalst: « Pioniro », lokaal: « De Koornbloem », Grootte Markt; vergaderingen elken Woensdag avond.
Aarschot: « La Progreso », lokaal « Vlaamsch Huis », Deertschestraat; vergaderingen elken Zaterdag avond.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esperantista », lokaal « De Nieuwe Carnot », Carnotstraat, 70, vergaderingen elken Woensdag avond.
« La Rekta Vojo »; lokaal « De Gulden Kroon », St. Jacobsmarkt, 98; vergaderingen Donderdags om de 14 dagen.
Brugge: « Katolika Junulara Esperanto Grupo », Guido Gezellelaan, 15.
Brussei: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.); lokaal « Breughel », Em. Jacquainlaan, 37; vergaderingen elken Donderdag avond.
Edegem: « Nia Idealo », Verbindingsstraat, 9.
Hamme: « Juna Flandrujo »; lokaal « Jong Vlaanderen », Kapelstraat, 5; vergaderingen elken Woensdag avond.
Kortrijk: « Esperantista Grupo »; lokaal « In den Tuin », IJzerweglaan, 5; vergaderingen elken Woensdag avond.
Lede: « La Esperanta Stelo »; sekretariaat: Krommenellenboog, 60. Lede.
Leuven: « Nova Tagiĝo »; sekretariaat: Tienschestraat, 106.
Lichtervelde: Sekretariaat, Weststraat, 47.
Mechelen: « La Estonto », vergadering elken Vrijdag te 20 uur, Hombeeksche steenweg, 54.
Oostende: « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Lijndraaiersstraat, 48.
Oudenaarde: « Al Paco »; sekretariaat: Nederstraat, 8.
Roeselare: « Ruselara Grupo Esperantista »; Statedreef, 177.
St. Niklaas: « Al Triumfo »; sekretariaat: Wegvoeringstraat, 73.

Alle inlichtingen verstrekken verder te:

Diksmuide: M. Maekelberg, Wilgenwijk, 28.
Gent: Juliette Terrijn, Raapstraat, 82.
Harelbeke: A. Doornaert, Stasegemstraat.
Hoboken: J. de Groot Caronstraat, 31.
Meenen: K. Depypere, Kortrijkstraat, 160.
Millen (Tongeren): L. Geukens, Langstraat.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: « La Paca Stelo », lokaal « Concordia », Statiestraat.
Thielt: R. Plettinck, Kromwalstraat, 24-c.
Wilrijk: Daniel Mortelmans, Egied Segerslaan, 14.
Astene: M. Vanderlinden, Dorp, 54.

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacqmainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)



Varbu Abonantojn kaj Anoncantojn !

Speciale rekomendita Restoracio

„ La Renommée ”

St. Baafsplaats, 3 — GENT — Tel. : 120.12

apud la Belfrido.

Estro VAN DER PLANCKEN persone direktas la kuirejon kaj prizorgos la festenon kaj lundan tagmanĝon de la

7a FLANDRA ESPERANTISTA KONGRESO

Huis aanbevolen door V. T. B.

« Presejo de l' Centro », Kipdorpvest, 26, Antwerpen.